

# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO II.—SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO».—Marto 1913.—N<sup>o</sup> 4 (10)

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88     Redaktoro : JOZEFO GRAU

---

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

---

ENHAVO : *Grupaj aferoj*, Malgraŭ. — *Projekto de unugrupiĝo*, Jozefo Grau.

---

---

## GRUPAJ AFEROJ

*Malavara donaco.*—La Biblioteko de nia grupo pliriĉiĝis per la tuta kolekto de «La Revuo» bele bindita, kiun la eminenta ŝakproblemisto kaj fervora samideano Sro. Jozefo Paluzie, donacis al la BARCELONA STELO. La Direkta Komitato danke de tiu altvalora donaco decidis en sia ordinara kunsido, la 27<sup>an</sup> de Marto, peti de Sinjoro Paluzie ke li akceptu fariĝi Honora membro de nia societo. Ni esprimas al li publike la plej koran dankon.

*Konkurso por niaj lernantoj.*—Laŭ la anoncita programo, okazis la 18<sup>an</sup> de Marto en nia sidejo la ekzamenoj de la Konkurso por la lernantoj de niaj kursoj. 20 el ili partoprenis en la ekzercoj. La rezultoj de la skriba provo estis tre kontentigaj kaj la parola provo farita antaŭ multaj aŭskultantoj pruvis ke la ekzamenoj bone konas nian lingvon. La Juĝantaro, kiu konsistis el Sroj. Rey, Pujulà, Pellicer, Gil kaj Grau unuanime aljuĝis la premiojn laŭ la jena ordo.

*Unua premio*, 15 pesetoj, al Sro: Antono Viñals. *Tri duaj premioj*, 5 pesetoj ĉiu, al gesinjoroj Rosa Cortés, Palmiro Gailleumot kaj Rafael Sorolla laŭ la ordo montrita. *Tri triaj premioj*, konsistantaj el unu ekzemplero de la Gramatiko kaj Vortaro de Sro. F. Pujulà, afable de li donacitaj, al gesinjoroj, Johano Puig, Mercé Rey kaj Bernabé Mira, kaj *Mencioj* al Sroj. Petro Navas kaj A. Graells.

Sro. Rey en la nomo de la komitato gratulis la profesorojn de la grupo, kiuj semis la ĝermojn tiel bele fruktodonintajn kaj Sinjoro Grau kuraĝigis la nelaŭreatojn laboradi konstante por atingi la premiojn en venontaj konkursoj.

La premioj estos disdonitaj dum la solena vesperfestoj, kiu estas organizata.

*Serio de paroladoj.* — La 3<sup>an</sup> de Aprilo Sro Pujulà komencis la serion de paroladoj por la lernantoj de nia supera kurso, parolante pri Parizo, pri kiu li rakontis per klaraj frazoj al la atentaj aŭskultantoj, kiuj malgrŭ la pluvego ĉeestis en nia sidejo.

Tiuj paroladoj okazos la unuan mardon de ĉiu monato kaj al ili estas de nun invititaj ĉiuj esperantistoj. La 6<sup>an</sup> de Majo parolados Sro. Grau pri la teorio de senfadena telegrafo, kaj en Junio Sinjoro Dalmau esprimos sian opinion pri la metodoj instrui Esperanton. La serion daŭrigos aliaj eminentaj pioniroj, kaj ni esperas, ke iliaj klopodoj prosperos altiri al tiuj kunvenetoj ne nur niajn grupanojn sed ankaŭ la ceterajn barcelonajn esperantistojn.

*Gazetoj ricevitaj interŝanĝe.* — Krom la en nia lasta n<sup>o</sup> 13 cititaj ni ricevis Grafologia Revuo'n kaj La Bulteno'n.

Ankaŭ estis ricevitaj diversaj cirkuleroj kaj la interesa verko aperinta en «Franca Esperantisto» *Studo pri la organizo de Esperanto.*

MALGRAŬ

## PROJEKTO DE UNUGRUPIGO

Ni ne povas pleumuni nian promeson ekpublici per tiu ĉi numero la projekton de regularo por la unugrupigo de la barcelonaj grupoj. Ni fidus je la indulgo de niaj samideanoj: La proksima numero enhavos la promesitan projekton kaj la proponojn de la komisiono pri ĝia esploro kaj akcepto.

JOZEFO GRAU

